

LA PIRATO

Storia per Saggi, umori, Voci Libere e relative

Scrittore: Giacomo SCHWARTZ

Historico, Historico e Amministrativo

Traduttore: S. Aronow Gallino

J. SCHUBINA

Traduttore (Dolci)

S. Rue Ballu, PARIS-10^e

FRANCESCO



NAVERAN GUMONATE

Ne occorre essi Krizan per laugrese
krizl dom krian

«Ullo» havi 325 Litrujn!



Dum nokto serena, kiam neniu kaperaĵo montriĝas ĉe l' horizonto, la piratoj kunvenas sur la ferdeko, ĉirkaŭ la centra masto, kaj rakontas... Ĉi tiun nokton la ŝipano Mutzumbur ekbruligis sian ŝipon, abunde kraĉis sur la ferdekon kaj ekparolis:

Tio okazis dum mia ĉeesto

Ĉiŝofoje, kiam nia ŝipo jetas la ankron en la haveno Tralala, ĉefurbo de Dzimbumlando, mi kutimas viziti la ĉefministron. Li estas, sed ne tre precize, mia kuzo, ĉar lia patrino servis dum sep semajnoj ĉe mia avino, kaj mia avo... (En tiu ĉi momento la aŭskultantoj laŭte malaprobis la parentezon kaj postulis la daŭrigon de la rakonto)... Li do estas mia kuzo. Kaj ni rilatas tre amike. Ĉar li estas tre okupita pri la diversaj aferoj de l' regado, li ĝenerale akceptas min en sia kabineto kaj babilante kun mi, li zorgas pri gravaj aferoj, alprenas decidojn ktp. Cetere tia laboremo provas, ke li ja estas mia kuzo, ĉar de ĉiam en mia familio... (Rafuĝe la pirataro per kri'-kaj-kraĉ' devigis la fanfaronulon reiri al la temo)...

Tiel okazis, ekzemple, dum nia lasta vizito, ke mia kuzo akceptis, kiam mi ĉeestis, genian elpensulon, kiu jam de longe estis petinta pri aŭdienco. Tial mi povas nun rakonti al vi, kio okazis.

Humile, tro humile, la genia elpensulo eniris, enkondukate de hela oficiro, bombaste majesta kaj serioza kiel striglata azeno, kaj li klarigis:

- Mi elpensis aparaton, per kiu oni povas ŝanĝi la opiniojn, la sentojn, eĉ la intencojn kaj decidojn de kiu ajn persono. Sufiĉas, ke oni kompostu per fiucela klavaro la nomon, antaŭnomon kaj agnon de l' trafoto, kaj poste, ke oni premu specialan butonon streĉe pensante pri la decido, kiun oni deziras sekrete trudi al li.

Mi alportis la aparaton ĝis la sojlo de via palaco, esperante, ke via malŝta deziras fari provon... »

Lia moŝto bonvolis. La stranga vizitanto eliris por prizorgi la alporton de l' mirinda aparato. La stranga vizitanto, baldaŭ poste, revenis kun du sklavoj portantaj mezgrandan keston, el kiu li eliris la faman aparaton, kun eleganta klavaro, kun tuboj, raduj, bobenoj, ŝadenoj kaj tiel plu. Kaj li demandis, pri kiu persono temas, kian opinion aŭ senton lia moŝto deziras inspiri al tiu persono. Nu, konkludante laŭ la proponitaj personoj kaj deziroj, mi konstatis, ke mia malfeliĉa kuzo, kiu regas grandan landon, kie li ĝuas senliman potencon kaj samtempe amon kaj respekton de l' tuta popolo, havas en sia propra hejmo neniom da aŭtoritateco. Ĉar jen, iom ĝenate, li ordonis, ke lia filo rezignu tiun projektatan edziĝon kun kaldronist-filino. — La ĝenia elpensulo fingrumis sian instrumenton kaj sammomente eksonoris la telefonilo. La ministro dekroĉis la aŭdilon kaj — ho mirige! — estis lia filo, kiu informis lin, ke li ne edziĝos! — Nun definitive certa pri la valoro de l' eltrovo mia kuzo deziris, ke lia filino ne iĝu monaĥino, ke lia edzino iĝu fidela, pli afabla (koncerne lin), ne spitema. Mi ne plu memoras pri ĉio, kion li volis ŝanĝi en ŝia karaktero, sed mi pensas, ke ĉio realiĝis.

Kaj nun, ĉar mia kuzo ne plu havis ion por deziri al si, li pensis pri la feliĉo de la lando.

« Bonvolu do, » li ordonis, « neniigi en la kapo de l' armil-fabrikantoj ĉiujn militplanojn kaj malpackombinojn, ĉar ili estas pli potencaj ol mi, kaj tio, kion ili volas, ofte okazas. »

« Ĉu via moŝto do deziras, ke ili ne plu fabriku armilojn? »

« Ne, — mi volas nur, ke ili ne plu favoru militojn, kiuj multobligas iliajn profitojn. »

« Via moŝto senkulpiĝu min, » ĝemis la konsternita elpensulo, — « mia aparato kapablas ŝanĝi la homan volon, sed ĝi ne povas alŝanĝi la homan naturon. »

RETSIGOR.

ENKETO PRI FAZEOLO

(Komunikajo de la Akademio)

En la monata bulteno « Pikarda Stelo » (N^o 55) ni trovis ĉi tiun dialogon inter elefantoj :

Juna elefanto. — Kion oni aŭdas? La tondron? La paflegon?

Maljuna elefanto. — Ne! Mi manĝis fazeolojn...

Ĉar ni tute ne komprenas, pri kio temas, ni pensas, ke ĉi tie estas io neklara, kion klarigi estos certe en la intereso de ĉiuj Esperantistoj.

Laŭ Kaŝe fazeolo estas « vegetaĵo (legomo) el la familio de l' fabacoj (*phaseolus*). » Ĉu iu povas kompletigi la supran difinon, precizante la komparon inter fazeolo kaj tondro aŭ paflego? — Ĉu ekzistas rilataj internacie konata? Se jes, laŭ kiu vulpunkto?

Detalajn respondojn bonvolu direkti rekte al nia Akademio, sekciu por Teknikaj Vortaroj.